



# HUNGARA BULTENO

2a n-ro

Oktobero 2021

---

## Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, 24 oktobro 2021

La 24an de oktobro 2021, ni festas 76 jarojn de Unuiĝintaj Nacioj, la plej ampleksa internacia organizo, la plej ambicia elpaŝo por internacia diplomatio kaj nuntempe la plej grava institucio por trovi kaj antaŭenigi tutmondajn solvojn por tutmondaj problemoj.

La nuntempaj defioj, ekde klimatsanĝiĝo ĝis genra malegaleco, ekde malpaco ĝis malsato, ekde deviga migrado ĝis maljusta diskriminacio, ekde KOVID-19 ĝis malsanaj vivkondiĉoj, ekde misinformado ĝis malriĉeco, montras, ke la mondo bezonas multe pli da multflankismo kaj kunlaborado. Kaj por tio ni devas konstrui la UN-on kiun la popoloj de la mondo bezonas.

Konfido kaj solidareco konsistigas esencan vojon por resanigi la mondon kaj konstrui pli bonan estontecon. Ni bonvenigas la vortojn de la Ĝenerala Sekretario António Guterres, en sia Komuna Tagordo, ke ni estas en turnopunkto de la historio: la alpaŝo al pli daŭripova kaj paca estonteco por la popoloj de la mondo kaj por la mondo kiel tuto dependas de ni, la nuna homaro – kaj de niaj decidoj. Post kelkaj tagoj, malfermiĝos en Glasgovo la Konferenco de UN pri Klimatsanĝiĝo, en kiu oni pridiskutos ne iujn lokajn problemojn aŭ regionajn malfacilaĵojn, nek tutmondajn problemetojn, sed la efektivan estontecon de la planedo kaj, kun ĝi, de la homa specio. Ĉu ĉi-foje, ĉu en tiu ĉi Internacia Jaro de Paco kaj Konfido, UN kaj ties membroj trovos la kuraĝon rekte alfronti tiun demandon? Ĉu la voĉoj de la homoj, en ĉiuj ties lingvoj, estos aŭskultataj de UN kaj la diversaj ŝtatoj?

Ni speciale atentigas pri la fundamenta rolo de lingvoj, en atingo de la Celoj por Daŭripova Evoluigo. Ni bezonas aŭskulti ĉiujn voĉojn kaj paroli kun ĉiuj. Tio eblos nur en mondo en kiu la diversaj lingvoj kaj iliaj parolantoj estos plene respektataj kaj UN praktikos maksimuman multlingvecon kaj elserĉos ĉiujn rimedojn por superi lingvajn barilojn. Diskriminacio kontraŭ unuopaj lingvoj kaj ties parolantoj estas neakceptebla.

La Esperanto-movado, kaj ene de ĝi Universala Esperanto-Asocio, antaŭenigas internacian kunlaboron, komprenemon kaj amikecon. Per la lingvo Esperanto ni disvastigas la mesaĝon de UN al ĉiuj anguloj de la mondo kaj per uzo de la lingvo ni praktikas aŭtentikan tutmondan dialogadon. Esperantistoj aktive partoprenas en internaciaj iniciatoj, kaj Universala Esperanto-Asocio, en sia konsulta statuso kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, klopodas disvastigi, pere de la Internacia Lingvo Esperanto, informojn pri UN, kaj varbi subtenon por ĝi. Ni favoras multlingvismon kaj ankaŭ klopodojn komunikiĝi trans la diversaj lingvoj.

En ĉi tiu tago plena je espero, ni invitas ĉiujn kuniĝi por realigi la celojn de UN: tutmondan pacon, tutmondan aplikon de homaj rajtoj kaj tutmondan daŭripovan evoluigon.

*István Szabolcs*

### **Pli feliĉaj lingvolernantoj, pli sukcesaj lingvoinstruistoj**

Ĉiun lernobjekton oni instruas irante de la pli facile alproprigebla al la pli komplika lernomaterialo. La lingvoinstruado estas escepto: ja en la nuna Eŭropo por la bazlernejoj oni komencas instrui la anglan lingvon, kvankam ankaŭ la prononco de la vorto „the” plurfoje kaŭzas malfacilaĵon, ne parolante pri la diferenco inter la skribitaj kaj prononcitaj vortoj kaj pri la enorme multaj gramatikaj esceptoj. Se por la etinfanoj oni instruas la planitan, neŭtralan, vivantan pontolingvon Esperanton, kiel unue lernendan fremdan lingvon kaj kapabloevoluiĝan lernobjekton, kaj poste komenciĝus la instruado de la multe pli malfacilaj naciaj lingvoj, ili havus tian sukcestravivaĵon, kian la lernado de aliaj lingvoj ne povas doni. Tiamaniere multaj etinfanoj ekŝatus la lingvolernadon, ili pli facile povus alproprigi la lingvojn de aliaj nacioj, eĉ ili povus pli facile orientiĝi en la gramatiko de siaj propraj gepatraj lingvoj. La porinfana lernolibro de la slovaka aŭtoro Stano Marček sub titolo „Esperanto per rekta metodo” – inter 45 lingvoj – estas tradukita ankaŭ en ĉiujn oficialajn lingvojn de la Eŭropa Unio, tiel la infanoj povus lerni en ĉiu lando la saman lernomaterialon. La lingvolernantoj fariĝus pli feliĉaj, la lingvoinstruistoj fariĝus pli sukcesaj. Por la civitanoj de la Eŭropa Unio evidentiĝus, ke inter la popoloj de EU la egalrajta komunikado povus realiĝi.

Jen la ligilo al la hungarlingva propono, helpe de kiu oni povas registriĝi, sekvi la sorton de la propono, aprobi ĝin kaj alparoli:

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/63064?locale=hu>

Mi iom malgaje vidas, ke mia propono  
„Boldogabb nyelvtanulók, sikeresebb nyelvtanárok”:

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/63064?locale=hu>

post jam preskaŭ 3 monatoj havas nur 87 APROBOJn kaj 548 SEKVANTOJn...

Laŭ mia opinio kaj forta konvinkigo **estus vera revolucio en la lingvoinstruado**,  
se en ĉiuj bazgradaj lernejoj de la Eŭropa Unio **Esperanto estus la unue lernenda, fremda  
lingvo**

**kaj kapabloevoluiga lernobjekto.**

Post unujara Esperanto-kurso la gepatroj kaj la infanoj kune povus libere elekti  
la lernenda(j)n nacia(j)n lingvo(j)n.

La infanoj ekŝatus, kaj ne ekmalamus la lingvolernadon, ili havus sukcestravivaĵon, kian  
la lernado de la malfacilaj, naciaj lingvoj ne povas doni.

**Ĉu ni rajtas senigi ilin je tiu ĉi sukcestravivaĵo?**

**Mi intence verkis mian proponon en hungara lingvo.** Mi ŝatintus ekzameni: 1.) Ĉu la  
„malgrandaj  
eŭropaj lingvoj” vere havas egalrajtan pozicion en la Eŭropa Unio? 2.) Kio okazos kun la  
malgrandaj landoj, lingvoj kaj iliaj kulturoj en la konstruotaj  
**Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo?** 3.) Ĉu miaj hungaraj sampatrujanoj grandnombre APROBOS  
mian proponon?

Ĉiuj tri respondoj estas sufiĉe elrevigaj...

Plej amike

Ludoviko Molnár

prezidanto de la – ankoraŭ ekzistanta, sed jam 52-jaraĝa – Budapeŝta

## Medicina Esperanto-Fakgrupo

Nu, kara Renato, eble la plimulto havas la impreson, ke ili "volas ion tute alian" ol ni. Sed pri kernaj problemoj ili ne konscias, ili formas sian "volon" surbaze de nekompleta rigardo al la reala mondo. Mi havas la impreson, ke ili pri la angla k.s.

- ne bone konscias, ke sud- kaj orienteŭropanoj parolas la anglan multege malpli ofte ol la nordokcidentanoj,
  - ne pripensis, ĉu tio iam ŝanĝiĝos,
  - ne pripensis, ke en landoj kaj regionoj kiel Rusio, arabaj landoj, hispanlingvio, Ĉinio kaj multaj aliaj la procentaĵo de anglaparlantoj tre supozeble estas larĝe sub 10%,
  - ne konscias pri la preskaŭ aŭ proksimume duobla lernotempo por la angla ĉe slavo kaj hungaroj kompare kun ekzemple nederlandanoj,
  - ne pripensis la demokratio-problemon por EU rezultantan el tio, se EU komunikas nur-angle,
  - ne pripensis la eble trioblan lernotempon por la angla ĉe multaj azianoj (kaj supozeble araboj),
  - ne pripensis, kiugrade do estos realisme, ke la angla signife plu disvastiĝos tutmonde (fakte ne tre),
  - ne konscias, ke jam en 1997 la British Council publikigis studon, laŭ kiu la instruado de la angla post malmultaj jardekoj atingos maksimumon (kaj aliaj simile prognozas).
- Certe ion gravan mi forgesis...

Kaj pri Esperanto kaj ties percepto mi jam skribis.

Unu el niaj taskoj do estas provi serioze diskuti la temaron kun iuj el tiu plejmulto, do trovi ĝuste tiujn malmultegajn, kiuj pretas formi al si opinion ne per transpreno el la plejmulto, sed per serioza rigardo al la faktoj.

Certe malfacila kaj longdaŭra tasko, mi konsentas. Sed mi ne vidas alian vojon.

Amike

Lu

*mi konsentas kaj konsentas. ni faras nian eblon por plibonigi Eŭropon kaj la mondon, sed ni havas malfacilan taskon, ĉar la plejmulto volas ion tute alian.*

*amike*

*renato*

Gekaraj,

venos la lasta mardo de la monato, do ek al la klubo de onjo Éva - persone aŭ rete! Ĉi foje prelegos Mézes Gyöngyi, konata ankaŭ en la movado kiel Cindrulino, novelektita estrarano de HEA

Temo: *Esperanto kaj mi*, la prelego estos interaktiva ankaŭ vi rajtas alparoli

Dato de kunveno: 26.10.2021

Tempo: 18.00 UTC+2

Loko: 1085 Budapest Gyulai Pál utca 9 (strato proksime al la placo Blaha Lujza, apud la malsanulejo Rókus)

Kui ne volas/povas veni persone, aliĝu per la suba ligilo:

join Zoom Meeting

<https://zoom.us/j/94772177985?pwd=RXZhWmZmeXVLOUdOaTVJeGpsbGFhdz09>

Meeting ID: 947 7217 7985

Passcode: 2M2BmA

Ĉiuj estas bonvenaj!

Sekvu nin ankaŭ per Evento Servo kaj Visaĝlibro!

Kara Komisianino,

Esperantistoj kaj iliaj simpatiuloj en Hungario jam subtenis proponojn por Esperanto kaj por ĝia utila rolo en EU je pli ol ducent okazoj. Esperanto ludas specialan rolon en Hungario, ĉar al hungaroj malfacilas lerni fremdajn lingvojn, kaj lerni Esperanton faciligas ilin kaj sukcesas ilin. Ĉi tio perfekte kongruas kun la lingva politiko de EU, kiu antaŭenigas 'lerni du pliajn lingvojn krom via gepatra lingvo'. En la kampo de Ideoj pri Edukado, la propono numero 23893 montras Esperanton en sia plena kapablo, kiel multlingva akcelilo ĝi estas forte subtenata bone rezonita. Esperanto ankaŭ ludas signifan rolon en la disvastigado de hungara kulturo. Ni do forte subtenas la proponojn pri oficiala agnosko de Esperanto, kiuj estis klasifikitaj kiel "Aliaj Ideoj". Propono numero 5399 titolita: "Esperanto, komuna kaj neŭtrala lingvo, desegnita por esti facile lernebla. Nova ilo por pli unuiĝinta Eŭropa Unio." Jen la propono farita de Eriq Hinojosa dirante: "Mi proponas iom post iom antaŭenigi la instruadon de Esperanto, kiel komuna kaj neŭtrala lingvo, desegnita por esti facile lernebla. La nova ilo por pli unuiĝinta Eŭropa Unio" Ĉi tiu propono ricevis ĝis nun 246 aprobojn. Propono numero 17955 titolita: „Oficiala agnosko de Esperanto kiel unu el la lingvoj de EU-civitanoj”. Bone argumentita propono farita de Louis v. Wunsch-Rolshoven dirante: "Ni petas oficialan agnoskon de Esperanto kiel lingvo de eŭropaj civitanoj fare de Eŭropa Unio" Ĉi tiu propono ricevis 294 subtenojn ĝis nun. Ĉi tiuj proponoj estas inter tiuj, kiuj ricevis la plej altajn nombrojn da aproboj en la kategorio "Aliaj Ideoj". Ni tre maltrankviliĝas, ĉu ĉi tiuj faktoj ne aperas bone en la raportoj pri la okazintaj debatoj.

Kara Komisianino,

En la 2a provizora raporto la proponoj de la sekcio Aliaj Ideoj ne estas prezentitaj. La raporto diras, ke ĉi tiuj ideoj estis reasignitaj al aliaj areoj - sed tio ankaŭ ne ŝajnas okazi, ĉar la du plej aprobitaj ideoj ne estas en iu ajn alia areo en iuj el la listoj de la plej subtenataj aŭ komentitaj ideoj. Tie ili devus esti menciitaj laŭ la nombro da voĉoj kaj komentoj. Bonvolu certigi, ke Proponoj 5399 kaj 17955 estas adekvate raportitaj, inkluzive ĉe Civitanaj Konferencoj. Antaŭdankon! István Szabolcs Prezidanto Hungara Esperanto-Asoci

(( Ni laboras streĉite ke la nombro de aproboj por la propono 23893 saltu baldaŭ supren, ni devas montri rekordon en lia grupo. Kiam mi kolektas subtenon de simpatiuloj, mi povas

montri nur unu proponon, jam du estas unu pli ol oni povas konsumi. Oficiala agnosko estas politiko - sed multlingva akcelilo estas senkulpa ŝafido...))

*István Szabolcs*

### **Hodiaŭ okazos io bona!**

"...Matene, antaŭ ol malfermi la okulojn ni starigu nian cerbon kaj pensadon tien, ke dum la tuta tago okazos bonaj aferoj al ni.

Ni diru ĝis la fino en ni tiun ĉi mallongan tekston:

Bonan matenon! Mi vekiĝis!

Mi deziras bonan matenon al mi mem, kaj al ĉiuj amataj kaj hodiaŭ renkontotaj. Hodiaŭ ĉio okazos bone.

Mi alkondukas lumradion al miaj piedfingroj, kondukas ĝin tra mia tuta korpo, kaj ridetas ĉiuj miaj ĉeletoj ĝojante pro la hodiaŭa tago

Hodiaŭ okazos io bona!

Ni provu tion, kaj vere okazos io bona!...

La potenco de penso kaj konscio vere kreas ... se nia cerbo ricevis

la mesaĝon, ke okazos bonaj aferoj, tiam ĝi preskaŭ elfiltris la malbonon. Ĝi ne rimarkos, kiu ne estas bona, ĉar ĝi serĉas nur la bonon.

Kaj foje jen ni vere rimarkos la malgrandajn, ĝojigajn aferojn!

Simple malfermiĝas en ni la pozitiva sento, pliboniĝos nia energio-mastrumado..."

Profesorino D-rino Emőke Bagdy: Kiel ni povus esti pli feliĉaj?

La Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo tre dankas la esperantigon al s-ro Instruisto Imre Szabó

*De d-ro Ludoviko Molnár kaj d-ino Julinjo Farkas*

*Estimataj kaj karaj samideanoj,*

Ĝoje spektu tiun ĉi filmeton pri la vivo de Ludoviko Zamenhof kaj, se vi volas, dissendu ĝin al viaj Esperantlingvaj geamikoj.

Vi povas ankaŭ prezenti ĝin dum viaj klubkunvenoj.

Kuraĝigajn salutojn.

J. H.

<https://www.facebook.com/100014743428404/posts/1190524351449001/?sfnsn=mo>

## **Gazetaraj Komunikoj de UEA**

N-ro 991

2021-10-23

---

## ELEKTO DE KOMITATANOJ B DE UEA: KANDIDATIĜU!

En 2022 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2022-2025. Parto de ĝi estos elekto de komitatanoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto ([art.24](#)) oni elektas unu komitatano B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM oni elektos kvin komitatanojn B.

La Ĝenerala Regularo ([art. 8](#)) difinas: “Dek individuaj membroj el minimume tri diversaj regnoj rajtas proponi unu solan kandidaton el inter la individuaj membroj. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn.”

Kompletaj proponoj atingu la Centran Oficejon de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) ĝis la 31-a de januaro 2022. Proponoj devas esti subskribitaj, do eblas uzi poŝton, fakson: +49 30 364 280 169 aŭ sendo de elektronike subskribita dokumento al la retpoŝtadreso: [bkomitatanoj2022@co.uea.org](mailto:bkomitatanoj2022@co.uea.org)

Por faciligi la kolekton de subtensubskriboj vi trovas formularon ĉe [https://uea.org/l/teko/komitataj/Kandidatigilo\\_Komitatanoj\\_B\\_2022\\_2025.pdf](https://uea.org/l/teko/komitataj/Kandidatigilo_Komitatanoj_B_2022_2025.pdf)

La uzo de formularo ne estas deviga. Eblas subteni per iu ajn subskribita dokumento.

Ĉiu kandidato devas esti IM de UEA dum la du antaŭaj jaroj (t.e. 2020 kaj 2021) kaj, se elektita, resti IM tra la tuta oficperiodo. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano. Komitatano, kiu persone ĉeestis neniun komitatkunsidon en la periodo 2016-2021, ne estas reelektebla.

Se ne estos pli ol kvin kandidatoj, ili ĉiuj estos elektitaj sen voĉdonado. Se la nombro estos pli granda, la individuaj membroj elektos kvin komitatanojn B per reta / poŝta balotado.

Ĉiu Gazetara Komunikado de UEA estas libere uzebla laŭ la [Permesilo CC BY 4.0](#).

Trovu antaŭajn Gazetarajn Komunikadojn en la retejo de UEA: [uea.org/aktuale/komunikoj](https://uea.org/aktuale/komunikoj)

La rekta ligilo por la komunikado: <https://uea.org/gk/991>

**Az elnökség megköszöni mindazon tagjainak a támogatást, akik már leadták a szavazatukat.**

**A javaslatok:**

**The EU needs improved language learning**

(EU bezonas pli bonan lingvolernadon)

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893>

argumentas por instrui lernejanon unue pri Esperanto antaŭ ol instrui aliajn lingvojn kiel la anglan. La relative rapida sukceso kun Esperanto tiam zorgas, ke la lernejanon lernas duan fremdan lingvon pli rapide, kiel montriĝis en pluraj landoj kadre de projekto de EU.

### **Official recognition of Esperanto as one of the languages of EU citizens**

(Oficiala agnosko de Esperanto kiel unu el la lingvoj de EU-civitanoj)

<https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/17955>

La propono instigas al Eŭropa Unio agnoski la lingvan realecon de Esperanto kaj rekoni Esperanton kiel unu el la lingvoj de EU-civitanoj. Ĝis nun Esperanto bedaŭrinde ofte mankas kiam oni prezentas la lingvan situacion en EU.

Támogatásra javasoljuk továbbá Dr Molnár Lajos tagtársunk javaslatát:

Boldogabb nyelvtanulók, sikeresebb nyelvtanárok

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/63064?locale=hu>

**Tisztelettel:**

**MESZ elnökség**

--

Köszönjük, ha adód 1% -val támogatsz a Magyarországi Esperantó Szövetséget!  
Adószámunk: 19003142-1-42

A rendelkező nyilatkozatot ide kattintva tudod letölteni:

[http://esperantohea.hu/hea/e107\\_plugins/docrep\\_menu/docrep.php?0.getdoc.89.5](http://esperantohea.hu/hea/e107_plugins/docrep_menu/docrep.php?0.getdoc.89.5).

**Bonan tagon,**

Mi petas publikigi suban mesaĝon ĉu plene, ĉu parte en ĉuj informkanaloj de hungaraj esperantistoj (retlistoj, retejoj, Facebook-paĝoj k.s.).

Antaŭdankon!

Amike,

Povilas JEGOROVAS

Estimataj kaj karaj.

Post dujara deviga pandemia paŭzo la 56aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj denove reale kaj fizike okazos en Litovio la 9-17 de Julio, 2022, ĉi-foje en Litovia havenurbo Klaipėda apud Balta maro, en la universitato de Klaipėda. Litova Esperanto-Asocio invitas vin ĉiujn partopreni kaj partoprenigi aliajn. La aranĝo estas dediĉata la la 770-jariĝo de Klaipėda kaj la 135-jariĝo de Esperanto.

BET-56 havas aŭspicion de la Universala Esperanto-Asocio.

Alta Protektanto de BET-56 estas la urbestro de Klaipėda Vytautas GRUBLIAUSKAS.

Detalaj informoj pri la aranĝo estas en Informa bulteno pri BET-56 ĉi-tie:

<https://sezonoj.ru/2021/08/bet-99/>

Reta aliĝilo al BET-56 estas trovebla ĉi-tie: <https://mallonge.net/gl>



BET-56 havas ĉiuf flankan subtenon kaj helpon de urbaj instancoj de Klaipėda kaj ankaŭ de la tutlandaj ŝtataj instancoj de Litovio.

Partoprenantoj de BET-56 havos luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo.

BET-56 estos vere altnivela internacia esperantista aranĝo kaj programe kaj organize. La programo kiel kutime dum BET-oj estos tre varia kaj interesa.

Organizantoj de BET-56 tre akurate zorgos pri ĉiuj sanprotektaj aferoj por eviti pandemiajn danĝerojn.

Ni atendas ne malpli ol 500 partoprenantojn el 30-40 landoj.

Litovaj esperantistoj faros ĉion eblan por kontentigi ĉies dezirojn kaj gustojn.

Konstante aktualigataj ĉiuspecaj informoj pri BET-56 estas en ties

retejo :<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56>

Aparta rubriko pri BET-56 estas ankaŭ en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto, kie estas

akumulataj ĉiuj gravaj informoj pri la aranĝo:<https://sezonoj.ru/bet/>

Ĉiujn aktualajn informojn pri BET-56 liveras ankaŭ la Eventa

Servo:<https://eventaservo.org/e/BET-56>

Listo de jamaj aliĝintoj al BET-56 estas ĉi-tie: [http://www.esperanto.lt/board/view.php?](http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=9)

[id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select\\_arrange=headnum&desc=asc&no=9](http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=9)

Videofilmeto pri Litovio en Esperanto estas spektebla ĉi-tie:

[http://www.esperanto.lt/board/view.php?](http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=5)

[id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select\\_arrange=headnum&desc=asc&no=5](http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=5)

Bonvolu plani Vian partoprenon en tiu-ĉi grava internacia esperantista aranĝo kaj disvastigi informojn pri sekvontjara BET-56 tra diversaj internaciaj kaj Vialandaj naciaj esperantistaj informkanaloj.

Informa bulteno pri BET-56, elŝutebla aliĝilo kaj emblemo de la aranĝo estas ankaŭ alkroĉitaj.

La aranĝo estos vere multnombra, interesa kaj utila. Partoprenu mem kaj invitu la aliajn.

Esperante, ke Vi kaj multaj aliaj esperantistoj partoprenos.

Amike,

Povilas JEGOROVAS

Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Prezidanto de Organiza komitato de BET-56

Tel. mobil. +370 687 12219

[pjedorovas@yahoo.com](mailto:pjedorovas@yahoo.com)

## **ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2021-07-15 ĝis 2021-10-15.

### **Eventoj**

#### **Kongreso-2021**

Malgraŭ malfacilaj cirkonstancoj, la 54-a kongreso de ILEI bone sukcesis en la formo de la retinario VEKI-2. La 2-a Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI, fakte, okazis inter la 7-a kaj la 14-a de aŭgusto 2021. Ĉeestis 156 partoprenantoj el 42 landoj. Benino, kiu devintus gastigi la ĉeestan kongreson, restis en la fokuso dum la Nacia vespero kaj dank' al la interesaj prelegoj de afrikaj profesoroj. La kongresa temo estis: "Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj". Ĉefprizorgantoj pri la programo de VEKI-2 estis Marija Belošević (Kroatio) kaj Mireille Grosjean (Svislando). Marija ricevis ankaŭ premion de UEA pro sia nelacigebla laboro riĉigi la kulturen flankon de ILEI pere de la pretigado de kongresaj programoj kaj Tagoj de Lernado dum la pasintaj jaroj. Radojica Petrović kaj Ivan Colling prizorgis la organizadon de la simpozio. La teknika flanko estis en la kapablaj manoj de Unika kaj de ŝia teamo de volontuloj, kun la helpo de Luis Obando. La Zoom-konto de IrEA estis uzata por la kongreso.

La ĉefaj partoj de VEKI-2 estis la sekvaj:

- 3 Grandaj Debatoj ("ILEI meze de la Esperanto-movado", "Tago de indiĝenaj popoloj kaj lingvoj", "Kiel efike instrui Esperanton en Afriko").
- 6 prelegoj (inkluzive de la du ĉefaj prelegoj pri la kongresa temo fare de Duncan Charters, prezidanto de UEA, kaj de Ilona Koutny de AMU)
- AMO-Retinario (kun 8 prelegoj dum du tagoj pri la temo "Edukado pri/al/per Esperanto-kulturo" kaj speciala sekcio pri E-o bibliotekoj)
- ILEI-Retpozio (kun dek prelegoj dum tri tagoj kaj diskutrondoj pri "Esperanto kaj interlingvistiko en supera edukado" kaj "Perspektivoj kaj plupaŝoj de internacia reta Esperanto-universitato")
- 3 ILEI-Kunsidoj (inkluzive ankaŭ de Estrar-elektado)
- 1 libro-prezentado
- 6 koncertoj
- 2 pri-filmaj prelegoj
- 1 ateliero

#### **Kongreso-2022**

Jam ekis la preparado por la venontaj kongresoj de ILEI. La 55-a kongreso okazos en Kebekurbo (Kanado). Komence de septembro Radojica Petrović rekontaktis la estrinon de la LKK, Suzanne Roy, kiu konfirmis la emon organizi ĉeestan kongreson tie. Laura Brazzabeni, la nova Estrarano pri Kongresoj, estas nun aktive helpanta la LKK ankaŭ pri la organiza flanko. Estis aprobita la emblemo por la kongreso, ĝisdatigita versio de tiu jam kreita fare de la LKK por la kongreso de 2020. La kongreso daŭros de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto

2022. La temo, kiu trovis la varman subtenon de la kebekaj samideanoj, ĉar ĝi bone respegulas la lokan situacion, estos: “La instruado de esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado”. Espereble per ĝi la LKK sukcesos ankaŭ varbadi neesperantistojn kaj interesigi ĵurnalistojn kaj aliajn. La temo de la simpozio povus esti la iom pli faka “Tradukado en instruado”, se evidentiĝos sufiĉe da intereso. En la venonta estrarkunsido estos traktataj kaj decidataj kotizoj por VEKI-2022 por povi poste komenci varbi partoprenontojn. Krom en la retejo de ILEI, informoj pri la kongreso de 2022 troviĝos ankaŭ en la retejo jam starigita fare de la LKK de la Kongreso-2023 en Massa, Italio, kiu tiel efektive funkcios por la venontaj du kongresoj.

### **Kongreso-2023**

La Kongreso de 2023 okazos en Massa, kie troviĝas la Nacia Esperanto-Biblioteko, aparte grava por la historio de ILEI. La estro de la LKK estas Bruĉjo Casini, kiu jam trovis tre taŭgan, malmultekostan kongresejon. La emblemo de la kongreso, desegnita de Alessandra kun la helpo de Bruĉjo, estis aprobita. La datoj estos de la 22-a ĝis la 29-a de julio 2023, tuj antaŭ la UK de Torino. La temo estos “Instrui Esperanton en lernejoj”. Kiel dirite, jam funkcias aparta retejo por la kongreso. En la venontaj estrarkunsidoj estos traktitaj kaj deciditaj kotizoj por la kongreso cele komenci frue varbi partoprenontojn. Oni povas esperi, fakte, ke pliboniĝontaj pandemiaj kondiĉoj povus finfine permesi antaŭvidi sufiĉe grandan ĉeeston kongreson en fama turisma loko tra montoj kaj maro.

Aparte grave por ILEI estas ankaŭ, ke al la kongreso ligiĝas projekto de instruado de Esperanto en la lernejoj de la itala regiono Tuskanio, nomata “30 Oraj Horoj”. Ĝi celas altigi la metalingvistikajn kapablojn de gelernantoj en italaj superaj mez-lernejoj precipe por klopodi plibonigi la rezultojn en testoj pri la itala. La ebla eksperimento jam trovis intereson inter la lokaj publik-lernejaj aŭtoritatoj. Rilate al tiu ĉi projekto, inter la membroj de la LKK, Bruĉjo kaj Enrico Borrello, volontulo de la Nacia Biblioteko de Esperanto de Massa, zorgas precipe pri la rilato kun lokaj politikistoj kaj administrantoj, dum Laura kunordigas la didaktikan parton kaj la rilatojn kun la Itala Instituto de Esperanto, kies Ĝenerala Direktoro ŝi nun estas. Krome, Alessandra estas pretiganta sciencan dokumenton, kies unua parto estis jam montrata al la Tuskanaj lernejoj aŭtoritatoj kaj kiu celas estonte ebligi similajn klopodojn en aliaj lokoj.

### **La Estraro**

La nova Estraro estis elektita dum la komitatkunsido de la 10-a de aŭgusto kaj oficiale eklaboris ekde la lasta tago de la kongreso, post la normala malŝarĝo de la antaŭa Estraro sekve de la pozitiva rezulto de la financa kontrolo. Ĉiuj 8 kandidatoj estis elektitaj. Ahmad Reza Mamduhi fariĝis la nova Prezidanto, Elena Nadikova la nova Sekretario kaj Karine Arakeljan la nova Estrarano pri Financoj. En la sekvaj estrarkunsidoj estis definitiva la tasko-divido inter ĉiuj membroj de la nova ILEI-Estraro. Jen ĝi:

**Prezidanto:** Ahmad Reza Mamduhi, Irano: Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

**Sekretario:** Elena Nadikova, Rusio: Lerneja Agado.

**Estrarano pri Financoj:** Karine Arakeljan, Armenio: Ekzamenoj

**Vic-prezidanto:** Alessandra Madella, Italio: Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

**Estrarano pri Kongresoj:** Laura Brazzabeni, Italio: Lerneja agado.

**Estrarano:** Marija Jerković, Kroatio: Lerneja kaj landa agadoj.

**Estrarano:** Fernando Pita, Brazilo: IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO, renovigado de la retejo kaj komunikiloj de ILEI.

**Estrarano:** Radojica Petrović, Serbio: Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado, renovigado de la retejo kaj komunikiloj de ILEI.

Regule okazas virtualaj estrarkunsidoj kaj estis starigataj du novaj listoj por estrara komunikado.

## **Sekcioj**

Prepariĝante al la venonta jaro, la sekcioj bonvolu kontroli siajn statojn kaj anonci modifojn, ankaŭ koncerne la revuojn.

## **Kapabligo**

Postsekvante la iniciaton de Mirejo, sub la gvido de Ahmad kaj Radojica la 8-an de oktobro sukcese disvolviĝis la 7-a Forumo de ILEI, uzante la Zoom-konton de IrEA. Entute 14 homoj partoprenis en libera diskutado pri la temo “Aktualaj spertoj pri la instruado de Esperanto en lernejoj”. La forumoj estas tradicie okazoj, kie pridiskuti ĉefajn zorgojn de ILEI, kiel la lertigadon de profesiaj instruistoj kaj neprofesiaj instruantoj de Esperanto tra la mondo. En tiu ĉi kazo, evidentiĝis precipe la neceso doni konsilojn kaj moralan subtenon al izolitaj instruistoj kaj instruemuloj kaj krei senpagajn materialojn, kiuj povus praktike montri al ili kiel instrui. ILEI alvokas ĉiujn instruemajn esperantistojn kaj simple interesiĝantojn pri tiu temo partopreni en la venonta forumo kaj helpi per la interŝanĝo de siaj ideoj kaj spertoj.

En certaj kazoj, la forumo povus ankaŭ iĝi loko, kie “provi” eblajn temojn por la kongresa simpozio, kiel ekzemple “Tradukado en instruado”, por vidi ĉu estas sufiĉe da intereso pri ili.

## **Premio La Torre**

Dank'al la subteno de familio La Torre, en septembro 2021 ILEI anoncis la trian Premion Mauro La Torre, kiu honoras la karmemoran Prezidanton de ILEI. La premio konsistas el 500 eŭroj por la plej bona eseo en Esperanto pri temoj rilataj al esplorkampoj kiel Esperanto-instruado, interkulturo, komputila analizo de tekstoj ktp. Pliaj informoj pri la limdatoj kaj detala priskribo de la eblaj esplorkampoj troviĝas en la sekva kunligo:

[https://www.ilei.info/novajxoj/PREMIO\\_MAURO\\_LA\\_TORRE.php](https://www.ilei.info/novajxoj/PREMIO_MAURO_LA_TORRE.php)

Konsiloj de Renato Corsetti por homoj, kiuj emus partopreni troviĝas ĉi tie:

<http://esperanto.cri.cn/e-club/enjoyreading/4204/20210928/704814.html>

La Estraro alvokas al la membroj mem pripensi partoprenon en la konkurso kaj helpi disvastigi la anoncon.

## **Universitata agado**

La ILEI-kongresa simpozio donis impulson al la tiuterenaj laboroj, kiujn sekvas kaj subtenas la interorganiza (ILEI/ESF/UEA/CED/TEJO) Universitata Laborgrupo. El ILEI-estraro la

laborgrupon partoprenas Ahmad Mamduhi, Alessandra Madella, Fernando Pita kaj Radojica Petrovic. En ĉiumonataj retkunsidoj, gvidataj de Renato Corsetti kun teknika subteno de IrEA, la laborgrupo analizas la rezultojn kaj diskutas plupaŝojn. Apartaj subgrupoj, gvidataj de Vicente Manzano Arrondo - Viko, prizorgas la projektojn:

- Internacia Reta Universitato de Esperanto (IRU-iniciativo), kie Esperanto estos uzata por universitatnivela edukado diversfaka;
- Retrevuo pri interkultura komunikado, titolita “Interkompreno”, kiu aperigos diverslingve recenzitajn sciencajn artikolojn pri interkulturaj rilatoj kun resumo en Esperanto kaj kun mallonga versio en populara lingvaĵo por nefaka publiko.

### **Eldonado**

Karine Arakelian estas pretiganta la kongresan libron de VEKI-1. Fernando Pita, kiel ĉefa prizorganto de la venontaj kongresaj simpozioj, pretigos librojn pri ili. Ĝis 2023, li ankaŭ pretigos por eldonado ampleksan kolekton de la plej bonaj artikoloj de IPR almenaŭ ekde la 80aj jaroj kaj li jam komencis serĉi la materialon. Ĉar ILEI mem nun havas “ISBN”-konton por eldonado kaj kutime multe pli da homoj havigas al si senpagajn librojn el interreto ol en papera eldono, tendence ILEI pensas multe pli eldoni interrete ol papere ekde nun. Jam montriĝis intereso kontakti la Estraron de ILEI por pridiskuti la eblan Esperantan tradukon kaj interretan eldonon de libroj pri pedagogiaj temoj. La Estraro estas esploranta la eblecon kunlabori tiucele, precipe se tio povus okazi senpage por ILEI.

### **Internacia Pedagogia Revuo (IPR)**

La skipo gvide de la redaktoro Jozefo Nemeth diligente laboris por regula eldono de la ĉefa organo de ILEI. Laŭ la plano de Fernando por la revuo, kiam la nova aŭ renovigita retejo estos plene funkcia, la retejo mem povos malmultekoste surprizi almenaŭ parton de la nunaj taskoj de IPR, kiu povus tiel eble iĝi pli faka revuo.

### **Juna Amiko (JA)**

Same Juna Amiko plu aperas regule kaj kun interesa enhavo danke al la valora laboro de la redaktoro Stano Marcek kaj la skipo de la rubrikestroj. La Estraro alvokas ĉiujn esperantistojn pri vasta varbado de la “juvelo” de ILEI.

### **ILEI en la Reto**

La komisiono por la renovigado de la retejo, gvidata fare de Fernando, nun havas ankaŭ la fakan subtenon de spertaj iranaj inĝenjeroj, kiuj volontule kunlaboros. Multe da sugestoj aperis fare de ILEI-anoj pri la maniero renovigi la retejon kaj la komisiono certe konsideros ilin por decidi la plej efikan, malmultekostan kaj sekuran manieron agi por daŭripova transiro. Intertempe, dank'al la laŭdinda laboro de ILEI-membroj, daŭre aperas diversaj aktualaj informoj en kanaloj de ILEI en Fejsbuko, Jutubo, tra dissendolistoj, krom en la retejo mem. ILEI strebas konigi ne nur la informojn pri siaj eventoj, sed pri instru- kaj kapabligaj iniciatoj kaj aranĝoj de aliaj siaj movadaj partneroj.

### **Kunlaboro kun enmovadaj institucioj**

### **Kunlaboro kun UEA**

ILEI estas kunlaboranta kun UEA por kandidatigi la projekton “30 Oraj Horoj” (kiel projekton de ILEI) kaj la ekologian animacion “Kungfua Kunikleto” (kiel projekton de la Fondaĵo NingNa) por la Premio Hamdan de UNESKO. La necesaj dokumentoj estas jam pretigitaj fare de Alessandra, en la unua kazo kun la helpo de la LKK de Massa-2023 kaj en la dua kun Max Garcia, produktanto de la Kunikleto.

Daŭre regule aperadas informoj pri ILEI-eventoj en la UEA-komuniko EKO.

UEA ankaŭ multe dissendis la informon pri la Premio La Torre per siaj kanaloj.

### **Kunlaboro kun aliaj enmovadaj institucioj**

Radojica daŭre kunlaboras kun Angela Tellier de ESF pri enketo pri la instruado de interlingvistiko kaj esperantologio en universitatoj.

Jam la antaŭa Estraro komencis pripensi pri ebla kunlaboro kun KosmoStrategio pri subvencipetado enkadre de la nova programo de EU Erasmus+ 2021-2027. Ankaŭ la nuna Estraro volus klopodi daŭrigi laŭ tiu vojo, se eblos, kaj petas helpon kaj sugestojn fare de ILEI-membroj por esplori kiel eble plej fruktodone tiun eblecon fortigi nian fakan agadon.

La observanto de TEJO, Albert Stalin Garrido, sin anoncis, estis aldonita al unu el la estraraj listoj kaj invitita partopreni en la estrarkunsidoj.

### **Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn! La Estraro aparte dankas Mirejon, kiu, malgraŭ siaj sanaj malfacilaĵoj, multe helpis per siaj konsiloj kaj scioj dum la transiro.

Vic-prezidanto de ILEI:

Alessandra Madella

Prezidanto de ILEI:

Ahmad Reza Mamduhi

2021-10-15

Las lastan mardon vespere en la klubo Onjo Eva disvolviĝis prelego de Perla Mielo pri *Muziko kaj mi*, kun ankaŭ kunkantado de esperantlingvaj kantoj ankaŭ el la repertoaro de Anjo Amika. Estis ankaŭ pere dum sekvantoj de la evento. Malgraŭ la eblo partopreni fizike, malmultaj alvenis por aŭskulti la prelegon de Perla. Eqstus bezonata pli da aktiveco de hungaraj esperantistoj, ĉefe loĝantaj en Budapeŝto, en la proksimeco de la ĉefurbo.

daŭrigote